

informilo por interlingvistoj

ipi

28-a jaro (tria serio) | n-ro 109 (4/2019) | ISSN 1385-2191

Eldonas: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) kaj Esperantic Studies Foundation

Enhavo

1. Mesaĝo de la redakcio	2
2. Lastatempaj eldonaĵoj: Libroj.....	2
3. Lastatempaj eldonaĵoj: Artikoloj.....	4
4. Disertacioj	5
5. Nekrologo	6
6. Estontaj aranĝoj	7
7. Esploroj pri Hector Hodler – kaj demando.....	9
8. Giuseppe Peano	9
9. Kongresis ILEI	9
10. Konferenco pri Multlingvaj Literaturoj ĉe la Halo Gregynog, Kimrio.....	10
11. Sanskrita Altlernejo, Kolkato.....	10
12. La Esperantologia Konferenco 2019	11
13. Scio sen Bariloj (SSB): Seminario por virinoj en Kotonuo, Benino	12
14. Esperanto-kurso en la Universitato de Leipzig, Germanio	12
15. Tradukologio ĉe la Universitato Surrey.....	13
16. E-libroj en Esperanto.....	13
17. Afrikaj projektoj ĉe la Universitato de Seviljo.....	14
18. Nova interkonsento fortigos polan kaj ĉinan esperantologian kunlaboron	14
19. Studraporta kunsido de Japana Esperanto-Instituto	14
20. Esperantology kaj interlingvistiko nun ĉe Tvitero.....	15
21. Esperanto kiel maniero pensi pri kultura diverseco	15
22. Internacia Pedagogia Revuo 2019/4.....	16
23. Language Problems and Language Planning (LPLP) 43/2 (2019).....	17

24. JKI: Lingvo Komunikado Informado	17
25. Universitataj Esperanto-kluboj: TEJO serĉas informojn.....	18
26. Falsaj novaĵoj.....	18
27. Esperanto en Ŝanhaja Universitato.....	18
28. Nacia legado en Esperanto en Krakovo, Pollando	18
29. Novaĵoj el la Universitato de Masaĉuseco	19
30. Amerika Konsilio pri Fremdlingva Instruado (ACTFL).....	19
31. Simpozio pri Planlingvoj kaj Lingvoplanado	20
32. Universala Kongreso de Esperanto, aŭgusto 2020	21
33. Postskriboj.....	22

1. Mesaĝo de la redakcio

Bonvenon al la nova numero de Ipl. Ni esperas, ke vi trovos ĝian enhavon utila. Tiu enhavo venas ĉefe de niaj legantoj; sekve, sendu al ni viajn anoncojn kaj sugestojn: ipi@esperantic.org.

Per tiu ĉi numero ni povas anonci novan procedon por subvencipetado de ESF. Ni anstataŭigos la antaŭan sen-datan sistemon, en kiu ni pritaksis proponojn individue kiam ili alvenis, per sistemo de fiksitaj limdatoj. Ekde la jaro 2020, subvencipetoj al ESF estos pritaksataj trifoje jare laŭ konkursa bazo. La limdatoj por prezenti petojn estas 31 januaro, 30 aprilo kaj 30 septembro. Malfrue alvenantaj petoj estos transmetitaj al la posta limdato. Prioritaton por financado ni donos al projektoj kiuj bone kongruas kun unu aŭ pluraj prioritataj terenoj de ESF, aŭ, se temas pri la Fonduso por Interlingvistika Subteno, kun ties kategorioj. Decidojn pri subvencio estas normale faritaj ene de unu monato. Detalojn pri la subvencipeta procedo vi trovos ĉe <https://www.esperantic.org/en/grants/available/> aŭ <https://www.esperantic.org/eo/stipendioj/stipendioj-de-esf/>

Inter lastatempaj subvencioj de ESF estas:

- Al Universala Esperanto-Asocioj por ties retejo uea.facila, nova retejo por lernantoj de Esperanto.
Al Eyder Gabriel Sima Lozano kaj Jesús Eduardo Fong Flores por studo “Lingvaj sintenoj kaj diverseco de migraj indiĝenaj personoj rilate siajn denaskajn lingvojn en Baja California, Meksiko.”
- Al Langfest 2019, Montréal, Kanado.

2. Lastatempaj eldonaĵoj: Libroj

Saussure, René de. 2018. *René de Saussure and the theory of word formation*. Red. Stephen R. Anderson k Louis de Saussure. Classics in Linguistics 6. Berlin: Language Science Press. 242p.

Ĉi tiu volumo prezentas du verkojn ellaborantajn ĝeneralan teorion de vortoj kaj ilian strukturon verkitajn de René de Saussure, pli juna frato de Ferdinand de Saussure. Kvankam originantaj el la zorgoj de René de Saussure pri la strukturo de Esperanto, ĉi tiuj eseoj klare celas prezenti ĝeneralan klarigon de vortformado en natura lingvaĵo. Ili aperas ĉi tie en la franca originalo kun alfrontaj anglaj tradukoj, akompanataj de iuj rimarkoj pri la vivo de René de Saussure kaj sekvataj de eseoj pri la esperantista fono de lia analizo (de Marc van Oostendorp), la nuntempa graveco de lia morfologia teorio (de Stephen Anderson), kaj la semantika teorio de vortoj kiu kuŝas sub lia analizo (de Louis de Saussure). Ĉi tiuj du verkoj restis esence nekonataj al la komunumo de kleruloj pri ĝenerala lingvistiko ekde ilia publikigo en 1911 kaj 1919 respektive, kvankam esperantistoj konis ilin. Ili disvolvas tute eksplicite teorion pri tio, kio poste estus nomata morfema analizo, bazita ĉefe sur datumoj de la franca (kun iom da materialo el la germana kaj la angla, kaj ankaŭ okazaj ekzemploj el aliaj hindeŭropaj lingvoj). En ĝia fundamenta aspekto, la vidpunkto de René pri vortformado diferencis signife de tiu de lia frato, kiu vidis la strukturon de kompleksaj vortoj kiel montrata ne per ilia diserigo en pli malgrandajn "atomajn" unuojn sed pli ĝuste en la rilatoj inter vortoj – rilatoj kiuj povus esti prezentitaj en analoga formo kaj kiuj antaŭvidas regulojn bazitajn sur reguloj pri morfologia strukturo. La kontrasto inter la vidpunktoj de la du fratoj tiel antaŭvidas bazajn demandojn en aktualaj teorioj pri vortstrukturo.

Simonnæs, Ingrid k Kristiansen, Marita, red. 2019. *Legal Translation. Current Issues and Challenges in Research, Methods and Applications*. Berlin: Frank & Timme. Kontribuaĵoj de Łucja Biel; Anabel Borja Albi k Robert Martínez-Carrasco; Deborah Cao; Elena Chiochetti, Flavia de Camillis k Isabella Stanizzi; Christina Dechamps; Cornelia Griebel; Ada Gruntar Jermol; Emilia Lindroos; Karin Luttermann k Claus Luttermann; Michele Mannoni; Gianluca Pontrandolfo; Barbara Pozzo; Fernando Prieto Ramos k Albert Morales Moreno; Rosario Martín Ruano; Juliette Scott; Radegundis Stolze; Catherine Way; Eva Wiesmann.

Dobrzyński, Roman. 2019. *Avo kiu estas nepo*. Varsovio: PEA.

Ilustrita biografio de la fama nepo de la aŭtoro de Esperanto. <http://katalogo.uea.org?inf=9731>

Ammon, Ulrich. 2019. *The Position of the German Language in the World*. London: Routledge. 672pp.

La studo fokusiĝas je la monda pozicio de la germana kaj la faktoroj kiuj laboras por subteni ĝian uzon kaj utilecon por internacia komunikado. El la perspektivo de la tutgloba lingva konstelacio, la detala datuma analizo de ĉi tiu substanca esplorprojekto prezentas la germanan kiel ekzemplon de duaranga lingvo. La libro ankaŭ disponigas modelon por analizo kaj priskribo de internaciaj lingvoj krom la angla. Ĝi ofertas kadron por plifortigo de la pozicio de lingvoj kiel la araba, la ĉina, la franca, la portugala, la hispana kaj aliaj, kaj por kontraŭagi troigajn asertojn pri la monda monopola pozicio de la angla. Ĉi tiu ampleksa manlibro pri la stato de la germana lingvo en la mondo estis origine eldonita en 2015 de Walter de Gruyter en la germana kaj estis kritike laŭdata. Taŭga por erudiciuloj kaj esploristoj de la germana lingvo, la manlibro montras detale, kiel komplete kaj ĝisfunde la germana kaj aliaj duarangaj lingvoj estas kunligitaj kun granda nombro da socioj kaj kiel ĉi tiuj statistikoj subtenas aŭ malfortigas la funkciojn kaj konservadon de la lingvoj.

Piperski, Aleksandr. 2017. *Konstruirovane yazykov ot esperanto do dotrakijskogo*. Moskva: Al'pina non-fikshn.

Striganova, Anna; Ŝevĉenko, Dmitrij k Wandel, Amri, red. 2019. *Internacia Kongresa Universitato, 72-a sesio / Sanmarineca Universitata Sesio, 36-a sesio*. Vilnius: Eldonejo Impeto, Litova Esperanto-Asocio. 198p. Kun resumoj de la ĉefaj ĉapitroj en la angla, franca, finna kaj sveda.

Enhavo:

Melina Bister k Jouko Lindstedt. *La sveda lingvo en Finnlando*

Ida Stria. *La finna(j) lingvo(j) en Svedio*

Leif Nordenstorm. *Sameoj – unu popolo en kvar landoj*

Orlando E. Raola. *Fiziko-kemia kompreno de la koloroj en nia universo*

Mark Fettes. *Indiĝenaj lingvoj kaj la streboj al daŭripovo*

Ulrich Lins. *Rudolf Carnap, la esperantisto*

Alessandra Madella. *La granda diktatoro kaj la historio de la metaforo de kinarta Esperanto*

Dmitrij Ŝevĉenko. *Esperanta libroeldonado en Moskvo: historio kaj nuntempo*

Bernhard Tuidier. *Alfred Hermann Fried: pacifisto kaj esperantisto – iluzio kaj vizio*

Amri Wandel. *Teleskopoj en la spaco: de Hubble ĝis James Webb*

Alfred Heiligenbrunner. *Pi, la historio de fama nombro*

Alfred Heiligenbrunner. *Gravitaj ondoj*

Hans Michael Maitzen. *Magnetsteloj – enigmaj ekzotuloj inter junaj kaj masecaj steloj*

Yves Nevelsteen. *Oftaj eraroj kaj novaj vortoj en Esperanto. Bitlibroj kaj bitgazetoj en Esperanto.*

200+ Esperantaj markonomoj en Benelukso

Orlando E. Raola. *Mediprotektada kemio*

Anna Striganova. *Fikcia literaturo. Ĉu formo de eskapismo?*

Manfred Westermayer. *Plastaĵoj en la diversaj akvosferoj.*

Belarta rikolto 2019, Premiitaj verkoj de la Belartaj Konkursoj de Universala Esperanto-Asocio.

New York: Mondial, 2019.

Poezio, prozo, mikronovelo, teatro, eseoj. Prezo: 9.90 EUR. *Pliaj informoj, reta mendilo:*

<http://katalogo.uea.org?inf=9749>

3. Lastatempaj eldonaĵoj: Artikoloj

Kosuch, Carolin. 2017. Die Menschen verstehen sich und können sich verständigen, weil sie ungleich sind. Zugehörigkeit durch Sprache um 1900 als jüdische Kontroverse zwischen Berlin und Białystock [Homoj interkompreniĝas kaj kapablas komuniki ĉar ili estas malegalaj: lingvoaparteno ĉirkaŭ la jaro 1900 kiel juda polemiko inter Berlino kaj Bjalistoko]. Themenportal Europäische Geschichte, 2017, <www.europa.clio-online.de/essay/id/fdae-1699>.

Moret, Sébastien. 2019. Jakob Linzbach on his life and work. *Sign Systems Studies* 47(1/2), 305–334. La estona fakulo Jakob Linzbach estas ĉefe konata pro sia aperigo, en 1916, de ruslingva libro kun titolo *La principoj de filozofia lingvaĵo: Klopodo al ekzakta lingvistiko*. En tiu libro, kaj en siaj aliaj publikigitaj kaj nepublikigitaj verkoj, li celis krei universalan skribitan lingvon en kiu miksiĝos matematiko kaj bildoj. La ideoj de Linzbach levis konscion inter homoj el diversaj studkampoj – semiotiko, interlingvistiko, filozofio, kinoteorio, informadiko, ktp. Tamen oni malmulton publikigis pri la vivo de Linzbach. En unu el liaj manuskriptoj kiu troviĝas en Tartu, estas ĉapitro kiun oni povas konsideri aŭtobiografia kaj kiu donas,

laŭ la krajono de Lindbach mem, informojn pri lia vivo kaj verko. La teksto estas redaktita, angligita kaj prikomentita tie ĉi por la unua fojo.

Alcalde, Javier. 2015. Linguistic Justice: An Interdisciplinary Overview of the Literature. *Amsterdam Working Papers in Multilingualism* 3: 27-96. [Lingva justeco: Interdisciplina superrigardo de la literaturo]

Koutny, Ilona. 2018. Can language create culture? A case study of the planned language Esperanto. En: Anna Biedrzyńska, Monika Zięba-Plebankiewicz k Grzegorz A. Ziętałi, red. *Język i jego wyzwania: język w kulturze, kultura w języku*. [‘Lingvo kaj gxiaj defioj: lingvo en la kulturo’]. Vol. I. Językoznawstwo [‘Lingvistiko’]. Nowy Sącz: Państwowa Wyższa Szkoła Zawodowa w Nowym Sączu. 69-75. [Ĉu lingvo povas krei kulturon? Kazostudo pri la planlingvo Esperanto]

La 25-an de aprilo 2019 en Moskvo, Rusio, en Rusia universitato de amikeco inter popoloj (RUDN University) okazis 3-a Internacia scienc-praktika konferenco “Lingvo kaj parolo en la interreto: personeco, socio, komunikado, kulturo”. Rezulte de la konferenco aperis duvoluma bonkvalite eldonita artikolaro. En la volumo 1 (ISBN 978-5-209-09400-5) aperis artikolo de Amri Wandel “How many people in the world speak Esperanto?” (Kiom da homoj en la mondo parolas Esperanton?). En la volumo 2 (ISBN 978-5-209-09401-2) aperis artikoloj de Anna Striganova “Неологизмы в языке эсперанто в сети Интернет (на примере социальной сети Facebook и эсперантоязычной Википедии)” (Neologismoj en la lingvo Esperanto en interreto (sur ekzemplo de la socia reto Facebook kaj Esperanta Vikipedio) kaj de Dmitrij Ševčenko - “Язык эсперанто в социальных сетях” (Lingvo Esperanto en sociaj retoj).

Federico Gobbo, Universiteit van Amsterdam / Università degli Studi di Torino aperigis kolekton de poeziaj specimenoj de diversaj aŭtoroj: “Promenadeto tra la poezio pri esperantismo” la 24-an de marto, 2019.

Prof. Gobbo skribis: “Laŭ PIV, specimeno estas ‘skizo de ia afero destinita veki scivolon k atenton de tiuj, kiuj povas interesiĝi pri tio.’ La espero estas, ke la leganto deziras pliprofundiĝi en la studado(n) de nia originala literaturo kaj aparte de poezio post la gustumado per la specimenoj kiujn mi proponas ĉi tie. La celo estas instigi fluparolantojn pripensi kio estas esperantisteco kaj esperantismo, sur la bazo de la poetoj kiuj starigis al si la demandon en la pasinteco. Ĉi tiu dokumento estis pretigita por samtitola supernivela Esperanto-kurso kiun mi gvidis en la naturdomo Krikenhaar en la regiono Almelo, Nederlando, okaze de la studsemajnfino organizita de Esperanto Nederland. Mi volas diri dankvorton al Davide Astori kaj Nicola Ruggiero, kun kiuj mi pasis agrablajn horojn parolante pri esperantismo (Davide kaj poezio (Nicola) tra la lastaj jaroj.”

Ŝajne nepublikigitaj studoj lastatempe aldonitaj al academia.edu:

Minnaja, Carlo. Aliro al Esperanto tra la literaturo.

Trunte, Nicolina. Pri la fonemaro de la Internacia Lingvo kaj esperantigo de propraj nomoj.

McElvenny, James. Meaning in the age of modernism: C.K. Ogden and his contemporaries.

Torosyan, Lusine. Why did Esperanto fail to become a world language?

Dieumegard, Pierre. Chu la Europa Unio povas flankenlasi Esperanton?

Alcalde, Javier. Nau demandoj pri lingva justeco en la fakliteraturo.

Fernández Assensio, Rubén. Lingvistiko, instrumentoj kaj Esperanto: Ne forlasu la plenkreskulojn!

Ruggiero, Nicola. Esperanto -- ponto al naciaj literaturoj

Jansen, Wim. La sufikso -ec en la Esperanta leksiko

4. Disertacioj

Guilherme Fians. 'Of Revolutionaries and Geeks: Mediation, Space and Time among Esperanto Speakers'. Thesis submitted to the University of Manchester for the degree of Doctor of Philosophy in the field of Social Anthropology. University of Manchester, United Kingdom. 07 June 2019.

Resumo:

Surbaze de longdaŭra etnografia kapolaboro inter Esperanto-parolantoj kaj esperantistoj plejparte, sed ne nur, en Parizo, mia disertacio demandas: kiel povas la Esperanto-komunumo kaj movado praktike ekzisti, se Esperanto-parolantoj estas ĉie en la mondo kaj, kelkfoje, ne havas multajn komunajn trajtojn krom la lingvo, kiun ili parolas?

Kreita en la fino de la 19a jarcento kaj historie subtenata kaj de intelektuloj kaj de maldekstraj aktivuloj ekde ĝia kreado, Esperanto nuntempe ankaŭ interesigas junulojn per sia interreta uzo. Iĝante pli ol lingvo, Esperanto kreigis ampleksan kaj geografie nelimigitan parolkomunumon, lingvon-bazitan socialan movadon, kaj diversajn kosmopolitajn principojn kaj specojn de sociumado ligitajn al ĉi tiu lingvo. Mi celas kontribui al debatoj pri kosmopolitismo, tutmondiĝo, internacia komunikado, internacia cirkulado kaj vojaĝado, esperoj pri estonteco kaj lingva aktivismo per analizo de perspektivoj de Esperanto-parolantoj kaj esperantistoj. Emfazante la kontrastajn ideojn, kiuj asertas Esperanton kiel 'afero de la pasinteco' kaj 'la lingvo de la estonteco', mi rigardas la manierojn, kiujn la lingvo estas uzata nuntempe, pere de ĉiutagaj praktikoj, kiel peranto inter homoj de malsamaj naciecoj kaj lingvaj fonoj. Francio, ĉefe Parizo, estas loko kie miaj esplordemandoj koincidas kun naciaj debatoj pri politiko kaj lingvoj. Tio kreas fruktodonan medion por analizi kiel Esperanto estas ofte rigardata pere de engaĝiĝoj kun tradiciaj sociaj movadoj kaj politikaj agadkaŭzoj (kiel komunismo, anarkiismo kaj pacismo) aŭ, alimaniere, kiel intelekta ludo kaj ilo por konstrui sociumecajn retojn kiuj transiras la limojn de la franca teritorio. El ĉi tiuj diskutoj, mia ĉefa argumento estas, ke la efemera naturo de la materialigoj de la Esperanto-komunumo estas tiu kiu igas engaĝiĝojn kun ĉi tiu lingvo aparte allogan kaj produktivan por siaj parolantoj kaj subtenantoj.

5. Nekrologo: Ludoviko Zaleski-Zamenhof

Louis-Christophe (Ludoviko Kristoforo) ZALESKI-ZAMENHOF (naskiĝis la 23-an de januaro 1925 en Varsovio, mortis la 9-an de oktobro 2019 en Parizo) estis doktoro inĝeniero pri surlanda kaj enmara konstruado, aparte pri premŝtalbetono, nepo de [L. L. Zamenhof](#). Li estis filo de [Adam Zamenhof](#) kaj [Wanda Zamenhof](#), naskita Frenkiel; la personan nomon li ricevis honore al sia avo, Ludoviko Zamenhof, la kreinto de Esperanto. Li estis Honora Membro de UEA.

Li studis en Varsovia Politekniko 1946-49 kaj diplomiĝis kiel inĝeniero pri konstruado, sekve doktoriĝis pri teknologio de streĉbetono. En 1959 li translokiĝis al Parizo kaj daŭrigis sian profesion karieron en Francio kaj aliaj landoj, realigante konstruaĵojn sur tero kaj maroj. Lia alia kampo de laboro estis didaktiko en la Arkitektura Altlernejo en Parizo kaj Politekniko de Milano. Li publikigis multajn artikolojn kaj librojn pri

sia fako. Post la emeritiĝo en 1993 li okupiĝis pri faka konsultado, ĉeestis sciencajn konferencojn kaj kongresojn, inkluzive de Esperanto-kongresoj. Ludoviko Kristoforo Zaleski-Zamenhof edziĝis en 1949 kun Krystyna Tyszka, kiu naskis du filinojn: Hanna (1953) kaj [Margaret](#) (1958). Li havis nepinon Klementina Zamenhof-Zaruski kaj nepon Pierre-Louis-Antoine Lebard.

Li loĝis en Parizo kun la edzino Juliette, naskita Sekrecka. Li parolis la francan, anglan kaj Esperanton, sed hejme la polan. Li havis la francan kaj polan civitanecojn, estis honora urbano de Bjalistoko.

En 1934 Ludoviko esprimis la deziron partopreni en la Universala Kongreso de Esperanto en Stokholmo. Liaj gepatroj asertis, ke partopreni en Esperanta kongreso, sen koni tiun ĉi lingvon mistrifigas la celon. La filo helpata de siaj onkloj [Zofia Zamenhof](#) kaj [Lidia Zamenhof](#) entuziasme eklernis kaj ekposedis flue la lingvon internacian. Tiel komenciĝis lia nova rolo de la „eta princo” dum laŭvicaj Esperantaj kongresoj. Li iĝis objekto de interesiĝo por la kongresanaro: en Stokholmo – 1934, en Romo – 1935, en Vieno - 1936 kaj en Varsovio – 1937, kie li nome de la familio Zamenhof, salutis la kongresanojn. Septembre 1939 la germanaj aviadiloj bombardis Varsovion. La domo ĉe la Królewska-strato 41, en kiu loĝis la familio Zamenhof, estis komplete detruita. Tiam Ludoviko estis nur 14-jara knabo.

En la lasta fazo de sia longa inĝeniera kariero d-ro Zaleski-Zamenhof montriĝis pioniro de streĉbretona konstruado de platformoj, por ĉerpi petrolon de sub la marfundo. Multajn jarojn li lektiis pri la teorio de konstruado en la Arkitektura Altlernejo en Parizo. Li estis ankaŭ kontrakta profesoro en Politekniko de Milano pri markonstruado el streĉita betono, krome lektiis de tempo al tempo pri la sama studobjekto en pluraj landoj, interalie en polaj politeknikoj en Gdansk kaj [Bjalistoko](#). Louis Christophe Zaleski-Zamenhof emeritiĝis 1993, sed li plu disponigis laŭbezone sian scion kaj sperton kiel konsultisto.

En 1987 Varsovio, kiel „lulilo de Esperanto”, estis ĝusta loko por celebri la centjaran jubileon de la lingvo internacia. La 72-a Universala Kongreso de Esperanto en la ĉefurbo de Pollando evidentiĝis la plej granda en la historio de la movado. Ĝi allogis 6 mil partoprenantojn, sen kalkuli proksimume unu milon da gastoj, kiuj alvenis sen la formala aliĝo el Sovet-Unio kaj el aliaj t.n. socialismaj landoj. La direktoro de UEA, Simo Milojević, sukcesis trovi en diversaj landoj de la mondo sep membrojn de la Zamenhofa familio, kiuj alvenis kiel honoraj gastoj, inter ili Louis Christophe Zaleski-Zamenhof kun la edzino Juliette. Li, kiel la nepo de la kreinto de Esperanto, varsoviano kaj monde renoma konstruisto de „artefaritaj insuloj” sur maroj kaj oceanoj, montriĝis aparta atrakcio por ĵurnalistoj, sed ankaŭ por la kongresanoj. Louis C. Zaleski-Zamenhof, reaperinte en la movado post dudekjara paŭzo, jam firme restis en ĝi. Li engaĝiĝis en la popularigon de la lingvo internacia kaj ĝia ideo per siaj intervjuoj por amaskomunikiloj. Li ankaŭ renkontiĝadis kun esperantistoj, kion respegulas la filmo aperinta en la Pola Televido s.t. „Śladami Dziadka” (Spuroj de la Avo). En ĝi la nepo estas montrita en kelkaj lokoj, ligitaj kun lia avo Ludoviko Zamenhof.

Bjalistoko iĝis ofta vizitcelo de L.C. Zaleski-Zamenhof. En la jaro 2000 li akceptis simbolan diplomon pro la fakto, ke lia avo Ludoviko Zamenhof gajnis la unuan lokon en la plebiscito por „Bjalistokano de la 20-a jarcento”. En la jaro 2007 li estis nomita honora urbano de Bjalistoko apud 14 aliaj distingitoj, inkluzive de Józef Piłsudski kaj Lech Wałęsa. Li plurfoje vizitis Bjalistokon kiel membro de la Fondumo Zamenhof respondeca pri la konstruo de Zamenhof-Centro.

Pli da informoj legu en la teksto de Roman Dobrzyński, aperigita en Vikipedio

https://eo.wikipedia.org/wiki/Louis-Christophe_Zaleski-Zamenhof

6. Estontaj aranĝoj

En Federacia Universitato de Paranao, en Kuritibo, Brazilo, okazos inter la 30-a de Novembro kaj la 4-a de Decembro la 1-a Internacia Renkontiĝo pri Politiko. Kadre de la Renkontiĝo estos Simpozio "Esperantologio kaj Interlingvistiko", kiun kunordigas Fernando Pita kaj Ivan Colling.
<http://www.isls.co/conference.php>.

La 26-a Monda Kongreso pri Politikologio okazos en Lisbono (25-29 julio 2020). La Esplorkomitato *La Politiko de Lingvo* (RC50) gastigos malferman podian diskuton pri "Mastrumi diversecon en publikaj administrado kaj politiko" (prezidos Michele Gazzola, Ulster University, kaj Luc Turgeon, University of Ottawa). La diskuto celas kolekti novigajn teoriajn kaj empiriajn kontribuojn pri la demando de mastrumado de lingvodiverseco en publika servado.

La Internacia Societo pri Lingvaj Studoj (International Society for Language Studies) kun kunspensado de Universidad de Tecnológica de Chile (INACAP) en La Serena, organizos konferencon la 27-29 majo, 2020, sur la kampuso de Universidad de Tecnológica de Chile en La Serena. La temo de la konferenco estos "Engaĝiĝo pri transformado en lingvaj studoj." Proponojn pri referaĵo oni akceptos ĝis 30 novembro 2019 – sed ne post tiu dato. Oni informos pri (mal)akcepto ĝis 15 januaro 2020. Ĉiuj prezentantoj, kiuj ne aliĝos al la konferenco ĝis 28 februaro, 2020, ne estos enprogramigitaj. Selektitaj konferencaj referaĵoj aperos en speciala numero de *Critical Inquiry in Language Studies: An International Journal* aŭ en la libroserio *Readings in Language Studies* en 2021. Ambaŭ tiuj aperigeblaj dependos de fakula taksado.

La konferenco kunvenigos ĉiliajn kaj tutmondajn fakulojn pri lingvostudoj, naciajn kaj internaciajn administrantojn kaj direktorojn de lingvoprogramoj, postdiplomajn studentojn, edukistojn kaj praktikantojn. Ni fieras, ke Ĉilio estas elektita kiel loko por ĉi tiu internacia konferenco, kun sia multlingva kaj multkultura komunumo. Venigi la Internacian Societon por Lingvaj Studoj al Ĉilio donas unikan ŝancon prezenti novigan esploradon ne nur en Ĉilio, sed tra Sud-Ameriko kaj la mondo.
<http://www.isls.co/conference.php>

3-a Internacia Konferenco pri Sociolingvistiko: Diversecoj, Novaj Medioj kaj Lingva Mastrumado. Tiu konferenco okazos 26-28 aŭgusto, ĉe Univerzita Karlova (Karola Universitato) kaj la Ĉeĥa Akademio de Sciencoj, Prago.

Ĉi tiu konferenco estas konceptita kiel alirebla nova forumo por plej lastatempaj sociolingvistikaj esploroj. Ĝi estas malferma al vasta gamo de sociolingvistikaj esploristoj, inkluzive de tiuj laborantaj ekster la anglo-okcidenta sociolingvistika tradicio, kiuj pritraktas la diversajn kaj rapide ŝanĝiĝantajn modojn de lingvaj interagoj en la tre diversa mondo de hodiaŭ. Post du manifestiĝoj en Budapeŝto, la evento nun translokiĝas al alia el la ĉefaj mezeŭropaj ĉefurboj, Prago. Venante el la eŭropa kunteksto, ni tre konscias pri la graveco de perspektivoj el diversaj anguloj de la mondo, inkluzive de tiuj, kiujn oni kutime ne aŭdas.

La ĉefaj temoj de la konferenco estas diversecoj, novaj amaskomunikiloj kaj lingva mastrumado. Ili respegulas la plej videblajn tendencojn de kaj tutmonda kaj loka perspektivoj: evoluantan diversecon kaj ĉietroveblon de la novaj amaskomunikiloj en la nuntempa socia mondo. La dinamika karaktero de diverseco en nuntempaj socioj povas igi nin al pli sentemaj al la mastrumado de lingvo kaj komunikado kiujn ni faras ĉiutage, kaj igi nin pli konsciaj pri nialingvouzo kaj komunikaj praktikoj entute. Novaj

amaskomunikiloj kaj iliaj diversaj ĝenroj reprezentas spacojn, kie ni povas tre rapide kaj facile pripensi lingvan uzadon, kaj uzi diversajn modojn por fari tion. Kompreneble la mastrumado de lingvo kaj komunikado ĉiam ekzistis – sed evoluis en la lastaj jaroj ĝia sociolingvistika analizo, kaŭzita, interalie, de la ŝanĝoj konstantaj okazantaj ĉirkaŭ ni. Ĉefparolantoj estos:

- Felix Banda (University of the Western Cape, South Africa)
- Dong Jie (Tsinghua University, China)
- Alexandre Duchêne & Collective MX90
- Milan Ferenčík (University of Prešov, Slovakia)
- Nkonko Kamwangamalu (Howard University, USA)
- Goro Christoph Kimura (Sophia University, Japan)

Prof. Kimura estas bone konata al parolantoj de Esperanto kaj kiel organizanto de la Nitobe-Simpozio en la Universitato Sofia en 2007.

Reta aliĝo kaj pliaj informoj ĉe: <https://www.ics3.org>

Lingvo-Politiko: Teorio, Metodo kaj Pledado por Nuntempa Geopolitiko estos la temo de simpozio ĉe la Monda Kongreso de la Internacia Asocio pri Aplikata Lingvistiko / Asocio Internacia Lingvo (AILA), 9-14 aŭgusto, en Groningen, Nederlando.

La Reto pri Lingvopolitika Esploro (LPRen), organizanto de la simpozio, gastigos tri duontagajn kunsidojn, organizitajn ĉirkaŭ tri areoj ene de la pli vasta kampo de esploroj rilataj al lingvopolitiko, politikologio kaj planado: Teorio, Metodo kaj Pledado. Ĉiu duona tago komenciĝos per prelego de elstara parolanto: Lionel Wee, Nacia Universitato de Singapuro, pri Teorio; Elana Shohamy, Universitato de Tel-Avivo, pri Metodo; kaj Nkonko Kamwangamalu, Universitato Howard, Pri Pledado.

Kunorganizantoj de la LPRen-Simpozio estas Sarah C.K. Moore, David Cassels Johnson, kaj Francis M. Hult.

7. Esploroj pri Hector Hodler – kaj demando

Skribas Mireille Grosjean: “La laboro pri la verkenda libro pri Hector Hodler bone kaj efike antaŭeniras. La esperantistaj aŭtoroj estas Ulrich Lins kaj Christian Lavarenne.”

En la verko *Utilita Estas Aliĝo* de Ulrich Lins (pĝ. 66, noto 28) aperas mencio de 300-paĝa verko de Hector Hodler en la franca, kun multaj tekstoj pri kreinda strukturo por la mondo post la fino de la milito, kun la ideo poste prenita de la prezidento Wilson havi 3 tutmondajn asociojn, unu de registaroj, unu de popoloj kaj unu de kulturaj personecoj. Nur la unua strukturo naskiĝis. Tamen tiu verko malaperis, au eble ne.... Ekzistis tri ekzempleroj. Unu estis ĉe UEA en Genevo kaj brulis en Palais Wilson. Unu malaperis. Unu estis ĉe Prezidento Wilson. Do tiu ĉi povus esti nun en Library of Congress en Washington. Ĉu iu usona esperantisto povus esplori pri tio? Ulrich Lins bezonus tiun verkon por sia laboro por la libro, kies celo estas prezenti ĉiujn facetojn de la personeco de Hodler.

8. Giuseppe Peano

Okaze de la 16-a kongreso pri Logiko, Metodiko kaj Filozofio de Scio kaj Tekniko en la Ĉeĥa Teknika Universitato (Prago), Basak Aray (Turkio) prelegis pri Giuseppe Peano, grava logikisto-matematikisto kiu kontribuis al la formado de la moderna logiko. La prelego estis parto de la sekcio “Historio kaj disvolviĝo de la moderna logiko”. Peano estas konata pro sia aritmetika aksiomaro kaj sia renovigo de la matematika simbolaro. Basak Aray elektis el lia verkaro alian temon ol la kutimaj, precize ĉar ĝi estas ankoraŭ malbone konata: interlingvistiko. Sekvante la verkojn de Leibniz pri la kreota universala lingvo, Peano kontribuis al la movado por internacia helplingvo per la kreado de Latino sine Flexione (poste renomita Interlingua). Latino sine Flexione estas konstruita konforme al Leibniz-aj principoj, kiuj forte influis la verkaron de Peano pri matematika notacio. La preleganto prezentis similecon inter tiuj du projektoj kaj montris la fonan planon de Leibniz kiu kunigas ilin. ESF subvenciis la prezenton.

9. Kongresis ILEI

La 52-a kongreso de la instruista ligo ILEI okazis de la 13-a ĝis la 20-a de julio, 2019, en Serbio, en la urbo Ĉaĉak, sude de Beogrado. Dum la kongreso okazis la 58-a AMO-seminario kun la temo “Esperanto – kiel konigi ĝin, kiel instrui ĝin”, kaj lingva festivalo (estis prezentita deko da lingvoj, inter ili indiĝenaj). Integra parto de la kongreso estis scienca konferenco “Lernado en virtualaj komunumoj”, malferma por esperantistaj kaj neesperantistaj universitatoj. La laborlingvoj estis Esperanto, la serba kaj la angla. La konferenco enfokusigis ankaŭ la lingvolernadon dediĉe al la jaro 2019 – Internacia Jaro de Indiĝenaj Lingvoj per du sekcioj: “Lerniloj kaj teknologioj en virtuala medio”, “Interkulturismo kaj lernado de lingvoj en virtualaj komunumoj”.

10. Konferenco pri Multlingvaj Literaturoj ĉe la Halo Gregynog, Kimrio

Raportas Alessandra Madella:

Inter la 17a kaj la 19a de julio 2019, danke al subteno de ESF, mi povis partopreni en konferenco pri Multlingvaj Literaturoj, organizata de la Universitato de Swansea (en Sudokcidenta Britujo). La konferenco okazis en la Halo Gregynog, historia konstruaĵo apartenanta al la Universitato de Kimrujo. La ĉefaj organizantoj estis Profesoro Julian Preece kaj D-ro Aled Rees, ambaŭ el Swansea, kaj estis pli malpli 45 partoprenantoj el literaturaj kaj (etno-) lingvistikaj fakoj. La konferenco estis tre internacia: malmultnombri britoj kaj plejmultis eksterlandanoj studentaj aŭ instruantaj en Britujo. Sed partoprenis ankaŭ prelegantoj el aliaj eŭropaj landoj, Norda kaj Centra Ameriko, Egiptujo, Israelo ktp. Mi estis la sola, kiu venis el Orienta Azio. Mi parolis preskaŭ kun ĉiuj pri Esperanto. Multaj demandis pri la Esperanta parto de la Aŭstra Nacia Biblioteko, miaj kursoj de Esperanto en Ĉinio, kiel mi lernis la lingvon, ktp.

De unu flanko, la programo substrekis la kimran kvaliton de la loko. La unua ĉefparolanto estis Profesoro Daniel G. Williams de Swansea Universitato, kiu pentris Dylan Thomas ne kiel la “poeton de Okcidenta universalismo”, sed kiel suferanta je melankolio pro la perdo de la mondo de la kimra lingvo, kiun liaj gepatroj ankoraŭ parolis. De la alia flanko, pluraj kontribuoj substrekis kiel koncepto de patrina lingvo ekskluzive ligata al klare markita etno aŭ kulturo perdis grandan parton de sia senco en niaj tempoj de

tutmondiĝo kaj amas-migrado. Nun verkistoj, kiel la japana poetino Tawada Yoko, kiu loĝas en Germanio, ofte klopodas mediacii per siaj kod-ŝanĝoj kaj mem-tradukoj inter malsamaj kulturoj. Mia prelego estis pri kiel la Esperanta romano *Mr. Tot aĉetas mil okulojn* (1931) de Jean Forge influis la lastan filmon de Fritz Lang kaj multlingvajn filmojn de la germana reĝisorino Ulrike Ottinger.

11. Sanskrita Altlernejo, Kolkato

Raportas Probal Dasgupta:

Mi volas raporti lastatempan agadon, okazintan la 11an de aŭgusto 2019, en Kolkato, la ĉefurbo de la gubernio Okcidenta Bengallando en orienta Barato. En Kolkato, la edukejo pli frue nomata Sanskrita Altlernejo, lastatempe renaskiĝinta kiel Sanskrita Altlernejo kaj Universitato (<http://www.sansuniv.ac.in/>), ĉiujare celebras sanskritan semajnon en la monato aŭgusto. Ĉi-jare enkadre de tiu semajno okazis seminario pri la temo 'Per novaj aliroj pristudi la epopeon Mahabarato'. Mi estis invitita tie prelegi, kaj mi elektis la prelegtitolon 'Prospecting for pedagogic accountability: reading Bhishma through Aleksis Kivi' ('prospektori por la pedagogia prirespondeco: legi [la mahabaratan rolulon] Bhiŝma tra la prismo de Aleksis Kivi'. La fakto ke mi aperis en sesio kun la stelula politologo Ranabir Samaddar havigis al mi modere grandan spektantaron. En la prelego mi diris ke en la (lastminuta) momento kiam mi ricevis la inviton prelegi, mi konstatis ke plene taŭgas al ĉi tiu seminario lastatempa teksto mia. Tiun tekston mi verkis (en la bengala lingvo, por faka revuo pri la kompara literaturo redaktata kaj eldonata de la tiufake prestiĝa universtato Jadavpur, ankaŭ situanta en Kolkato) lige kun mia lastatempe plenumita peresperanta bengaligo de la 19a-jarcenta finna klasikaĵo *Sep fratoj*, romano de Aleksis Kivi. En tiu mia kompara analizo, ĉefrolis la fakto ke plenkreskuloj kiuj instruas al infanoj fundamentajn valorojn ofte videble malkapablas mem ekzempli tiujn valorojn. Poste la infanoj plenkreskas kaj rerigardas la dume maljuniĝintajn instruintojn, kaj pro kompato kaj pardonemo pretas tamen, fine de la tago, aŭskulti ilin.

Mi emfazis la fakton ke la ebleco kompari kun la finna klasikaĵo nove prilumas tiun pedagogian ciklon en Mahabarato. Mia prezentinto (kaj la tiusesia prezidanto), la rektoro Paula Banerjee, jam en sia prezento, krom substreki mian laboron kiel lingvisto, ankaŭ forte emfazis mian ligitecon al Esperanto. Mi tial sen aparta reemfazo menciis la rolon de la Esperanta pontotraduko kiel faktoro en mia traduko de *Sep fratoj* en la bengalan. Tiamaniere la ebleco uzi Esperanton kiel ordinaran laborilon en la fakaj laboroj akiris por tiu publiko la statuson de io plene normala kion faras diversaj kleruloj.

En universitataj medioj, mi trovis ke tiu aliro pli efike establas la nemalhaveblon de Esperanto ol rektaj klopodoj varbi por la lingvo aŭ por la movado.

12. La Esperantologia Konferenco 2019

En Lahti, kadre de la 104a Universala Kongreso de Esperanto, okazis la 42a Esperantologia Konferenco. Ĉi jare, la partoprenantoj pritraktis du apartajn temojn: la interlingvistikan aliron al piĝinoj kaj kreoloj, kaj la indiĝenajn lingvojn: nuntempo kaj estonteco, okaze de la deklarita de Unuiĝintaj Nacioj por 2019 Internacia Jaro de Indiĝenaj Lingvoj. La unuan temon enkondukis prelego de Bengt-Arne Wickström. Li

analizis la komunikan facilecon de supre planita kaj spontanee evoluigita lingvo per komparo de kelkaj aspektoj de la planlingvo Esperanto kaj la piĝino Tok Pisin, nuntempe uzata en Papuo-Nov-Gvineo. Sekvis la unua interveno pri indiĝenaj lingvoj, fare de juna brazila esploristino-esperantologo Karina Oliveira, kies doktora disertacio temis pri la evoluo de la studo de indiĝenaj lingvoj en Brazilo dum la 20a jarcento. Francois Lo Jacomo kontribuis pecon pri la ebleco eviti la formorton de lingvoj ĝenerale per la disvastigo de Esperanto, interalie ĉar la esperanto-parolantoj atentigas la socion pri la fenomeno de lingvo-malapero. Denove al indiĝenaj lingvoj, alia juna esploristino, Mauela Burghilea, el Rumanio, prezentis al la ĉeestantoj la laboron de Tutmondaj Voĉoj (Global Voices), senprofitcela organizaĵo kiu regule tradukas artikolojn kaj intervjuojn de aktivuloj por indiĝenaj lingvoj. La posttagmezan sesion kronis la surpodia diskuto gvidata de Humphrey Tonkin, kiu kune kun Wera Blanke, Carlo Minnaja, Ulrich Lins kaj aliaj prilumis la problemojn nuntempe alfrontatajn de esperantologoj kaj la vojojn al frukt plena estonteco en tiu ĉi disciplino.

13. Scio sen Bariloj (SSB): Seminario por virinoj en Kotonuo, Benino

Raporto de Mireille Grosjean, 28 oktobro 2019:

Tiu ĉi seminario estas direktita al:

Kapabligo de virinoj en gvidaj roloj

Malkovro kaj eklernado de Esperanto

Legado kaj skribado de la fonua lingvo, ĉefa benina lingvo.

Temas pri plena semajno en formo de studcela kunloĝado. Ĝi sekvas unu el la ĉefaj celoj de UNESKO: Afriko kaj Virinoj. Jen la tria tia semajno kun homogena grupo el universitatnivelaĵoj junaj virinoj. Venis subteno de privatuloj al SSB. Rezulto estas, ke SSB povis akcepti 20 partoprenantinojn. Biologio, merkato, sociologio, antropologio, geografio, agrikulturo, informatiko, kemio, librotendo, juro, asekuroj, estas iliaj studobjektoj. Ili nun studas aŭ jam finstudis kaj serĉas laborpostenojn.

Lunde matene la 28-an de oktobro 2019 okazis la malfermo kun diversaj prelegoj. La prezidanto Privas Tchikpe prezentis la asocion Scio Sen Bariloj kaj ties diversajn agadojn en Benino, Togolando kaj Senegalio: SSB kontribuas al subteno de kreskigo de scioj en iuj kampoj kaj por iuj publikoj. Mireille Grosjean prezentis la tri aksojn de la Seminario parolante pri arbo: radikoj (fonua lingvo) trunko (lertigado de virinoj en gvidaj roloj) kaj branĉoj (Esperanto por malfermi sin al la mondo) kaj menciis la Internacian Jaron de indiĝenaj lingvoj, kiu disvolviĝas en 2019 kaj kies celo estas kongrua kun unu el la tri aksoj de la Seminario. Ŝi laŭtlegis du mesaĝojn de antaŭaj partoprenantinoj. La ĉefino de la 10-a distrikto de la urbo Kotonuo, Sinjorino Monique Konhonou, vic-urbestrino, partoprenis la malfermon kaj parolis kuraĝige al la partoprenantinoj. Venis du reprezentantoj de la ŝtata oficejo pri instruado en la naciaj lingvoj kaj la du instruistinoj de la fonua lingvo dungitaj de SSB. La laboro pluiras ĝis sabato matene.

La UEA-konto de « Scio Sen Bariloj » estas assb-k. Notindas, ke pro tiu agado kaj aliaj klopodoj Privas Tchikpe ricevis diplomon de UEA pri “elstara agado” en la Universala Kongreso de Esperanto 2019 en Finnlando.

14. Esperanto-kurso en la Universitato de Leipzig, Germanio

Raportas Sabine Fiedler:

Dum la vintra semestro 2018/2019 en la Universitato de Leipzig (Germanio) okazis interlingvistika modulo por studentoj de diversaj institutoj de la sociscienca fakultato. Ĝi baziĝis sur la modelo de interlingvistika modulo financita de ESF en la vintra semestro 2007/08 (vd. la laborraporton en "Language Problems & Language Planning" 32/3 pp. 269-279) kaj konsistis el tri elementoj:

Prelego (90 minuta ĉiusemajna) pri problemoj de internacia komunikado kaj lingva justeco kun superrigardo pri la historio kaj nuna uzado de planlingvoj ("Linguistic Communication in Europe: Debates and Possible Solutions")

Seminario (90 minuta, ĉiusemajna: "The Multilingual Challenge") pri lingvopolitikaj kaj kulturaj aspektoj de internacia lingvouzo kun fokuso pri la angla lingvo. Tiu parto de la modulo estas ordinara parto de la instruprogramo pri la angla kaj devas varii de unu semestro al alia por eviti ripetojn por la studentoj (ĝisnunaj seminarioj estis "English as a lingua franca", "Language & Mobility").

Lingvokurso Esperanto (90 minuta, ĉiusemajna). Tiu modulo montriĝis speciale taŭga kiel universitata interlingvistika instruformo, ĉar ĝi kombinas la instruadon de teoriaj konoj pri la defioj de internaciaj lingvokomunikado kaj lingvojusteco kun praktika lernado de Esperanto.

La modulo realiĝis en la priskribita formo. La lingvokurso financita de ESF komenciĝis la 18-an de oktobro 2018 kaj finiĝis la 30-an de marto per parolaj ekzamenoj. La kurso baziĝis sur memstara studado helpe de la reta kurso lernu.net, partoprenado en lecionoj en la universitato kaj konsultado en skajpaj diskutoj kaj reta babilejo. La kursgvidanto estis d-ro Cyril Robert Brosch. La modulon kaj lingvokurson finis sukcesplene 24 studentoj. Ili atingis nivelon B1 laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro pri Lingvoj. La Societo pri Interlingvistiko (GIL) planas finance subteni kelkajn inter ili per senkosta partoprenado de la ĉi-jara GIL-kunveno por ke ili daŭrigu sian okupon pri interlingvistiko.

15. Tradukologio ĉe la Universitato Surrey

La Centro pri Tradukologio en la Universitato Surrey, Britio, lastatempe ricevis signifan subvencion [Expanding Excellence in England](#) por lanĉi ambician novan esploran programon. La programo fokusiĝos je la konverĝo de homaj kaj aŭtomatigitaj pritraktoj de diversaj formoj de tradukado, aŭdvida/multmoda tradukado kaj interpretado. Ĝi kunvenigos home bazitajn esplorajn praktikojn kun progresoj en maŝinlernado kaj AI por ebligi kaj antaŭenigi la respondecan integradon de homa kaj maŝina tradukado.

16. E-libroj en Esperanto

De la Novaĵservo Ret-Info:

Ni proponas al via atento:

Interretaj Esperanto-bibliotekoj de elektronikaj libroj:

<https://docs.google.com/document/d/10LjTsROv1FDIQvz5I-GbaM3HuEZKgKHyszuWH6Yx38I/edit>

La kolekto estis farita por la fejsbuka grupo: "Pdf-/Epub-librejo".

17. Afrikaj projektoj ĉe la Universitato de Sevilo

La Universitato de Sevilo akceptis kaj apogos novan projekton por Afriko, kies oficiala lingvo estas Esperanto. Partoprenas Benino, Togolando, Malio, DR Kongo, Ruando, Madagaskaro kaj Sudafriko. La celo estas helpi starigon de afrika reto pri kulturoj kaj lingvoj, danke al la kunlaboro de aktivuloj, bazaj lernejoj kaj universitatoj en ĉiu lando. La projekto okazos ekde fino de julio ĝis komenco de oktobro. Estas apogata per la malalta kvanto de kvin mil eŭrojn, sed ankaŭ gravas la institucia apogo kaj la fakto, ke universitato oficiale apogas Esperantan agadon. La projekto havos ankaŭ specifan retpaĝon, kies daŭro devas esti senlima. Baza celo estas, ke pere de Esperanto kaj afrika identeco multaj homoj sentos malpli izolaj rilate siajn kulturon kaj lingvon gepatrajn. Pli da informo: viko@us.es.

18. Nova interkonsento fortigos polan kaj ĉinan esperantologian kunlaboron

La 28-an de julio en Poznano la rektoro de Zaozhuang Universitato Prof. CAO Shengqiang kaj la vicrektoro de Universitato Adam Mickiewicz Prof. Ryszard Naskręcki subskribis kontrakton pri kunlaboro inter la du universitatoj en la tereno de instruado de esperantologio kaj interlingvistiko. Estas planate, ke iuj studentoj el Zaozhuang-Universitato post akiro de bakalaŭra grado pri esperanto venos magistriĝi al UAM. La ĉina delegacio antaŭe kunsidis kun prof. Ilona Koutny, gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj de UAM, por priparoli la kunlaborajn eblecojn.

19. Studraporta kunsido de Japana Esperanto-Instituto

Dum la 106-a Japana Esperanto-Kongreso en Saitama, 2019-10-13/14, okazis la tradicia studraporta kunsido de Japana Esperanto-Instituto. Pro la tajfuno devis esti ŝanĝita la programaranĝo, sed ni sukcesis plenumi ĉiujn planitajn prelegojn. En la tri partoj partoprenis sume 39 personoj. En la unua parto raportis tri prelegantoj. KITAGAWA Hisasi raportis en la japana kun la titolo: "Vortaro Japana-Esperanta" de Miyamoto Masao el la vidpunkto de la ĉeftradukisto de "Kanĵi-Vortaro por Lernantoj: Esperanta Eldono". Li prezentis kritikindajn punktojn en la vortaro de Miyamoto kun dekoj da ekzemploj. HAGIWARA Yoko raportis en la japana kun la titolo "La vojo al Japanio de la lingvo Esperanto Parto 3: Londono → Tokio". Ŝi prezentis, ke en februaro 1903 iu anonima aŭtoro verkis artikolon, kiu estas la unua prezento de Esperanto en la japana gazetaro kaj pli frua ol tiu de YOSINO Sakuzo. MATUMOTO Sunao raportis en la japana kun la titolo "Leteroj rivelantaj la pensspuron de Q Ei al la

kreado de lia originala pentrarto". Li, kiu tradukis 64 esperantajn leterojn de Q Ei en la japanan, prezentis vivon de la artisto-esperantisto kaj eĥojn de la traduko en gazetaro.

En la dua parto raportis tri prelegantoj. SANO Hiroshi raportis en la japana kun la titolo "Rearanĝoskatolo por Konjunkcioj". Li proponis metodon por faciligi lernadon de esperantaj konjunkcioj. SESIMO Masaya raportis en la japana kun la titolo "Atesto de tafsiro de la Sankta Korano de Italo Chiussi tra tradukado de Asma' Allah al-Husna". Laŭ lia esploro 60 procentoj de la tradukitaj nomoj de Dio akordas laŭsence kaj laŭstrukture kun la araba originalo. 28 procentoj laŭsence parte akordas kaj 12 procentoj estas laŭ interpreto de la tradukinto. ISIKAWA Takasi raportis en Esperanto kun la titolo "Medialo en Esperanto". Li prezentis uzon de medialo en pluraj lingvoj inkluzive de Esperanto kaj asertis, ke Zamenhof transprenis la ideon de medialo ĉefe el la rusa lingvo.

En la tria parto raportis Miakelo BRONŜTEJN en Esperanto kun la titolo "Akita Uĵaku en Soveta Unio". Li priskribis la vojaĝon de Akita en Soveta Unio, aparte detale tiun en Belorusio. Tre impresa estis lia atesto, ke sortoj de tiuj, kiuj renkontiĝis kun la japana verkisto dumvojaĝe, poste estis tragediaj. Resumoj de la prelegoj estis eldonitaj en broŝuro "Resumoj de la prelegoj de la Studraporta Kunsido de JEI, 2019", kiu estas aĉetebla ĉe JEI.

Raportis: HIROTAKA Masaaki (Komitato por Studraporta Kunsido)

20. Esperantologio kaj interlingvistiko nun ĉe Tvitero

Restu ĝisdata pri la plej aktualaj universitataj novaĵoj pri esperantologio kaj interlingvistiko per nia nova Tvitera konto – bona maniero resti informita pri la novaĵoj ‘dumrealiĝe’ inter eldonoj de Ipl:

‘Laborante apoge al ESF por fortigi kunlaboron inter universitatoj kaj aliaj fakuloj interesataj de Esperanto kaj interlingvistiko’.

Sekvu nin! @ESFAdemic.

21. Esperanto kiel maniero pensi pri kultura diverseco

Raportas A. Giridhar Rao:

Mi verkis la eseon "Esperanto kiel pensilo pri kultura diverseco" baze de mia (18-minuta) video-prelego dum la 9-a Azia Kongreso en Vjetnamio. Vi povas spekti ĝin ĉi tie:

<https://www.youtube.com/watch?v=wejfeo8exfU>.

El la lasta revuo *Esperanto en Azio kaj Oceanio*:

Esperanto kiel pensilo pri kultura diverseco de d-ro A. Giridhar RAO (Universitato Azim Premji, Bengaluro, Barato)

Enlande. Esperanto rolas grave ankaŭ ene de niaj landoj. Kompreneble gravas instrui la lingvon mem; sed gravas ankaŭ la idearo de Esperanto. Mi donu la ekzemplon de la kurso “Esperanto kaj lingva demokratio” kiun mi gvidas en Universitato Azim Premji [premĝi], en Bengaluro, Barato. La celo de la kurso ne estas, ke la studentoj lernos nian lingvon. En la kurso, ni esploras diversajn aspektojn de la lingva diverseco de Barato. Esperanto estas prezentata kiel unu funkcia modelo de strebo al lingva demokratio.

Pasintjare, ekzemple, en kurskomenca lingva enketo, ni malkovris pli ol 30 lingvonomojn inter la 45 homoj en la klasĉambro! Pripensante siajn proprajn lingvovivojn, la studentoj rimarkis la hierarkiojn en la prestiĝo de tiuj lingvoj. Post iom da esplorado, ili ekkomprenis, ke lingvoj iĝas prestiĝaj pro kialoj politikaj kaj ekonomiaj; t. e., la kialoj estas sociohistoriaj, ne lingvaj. Ĉi tiu kompreno instigis ilin repensi pri antaŭsupozoj pri la kategorioj “lingvo” kaj “dialekto”. Ili jam bone sciis pri diskriminacio laŭ la aksoj de regiono, ekonomia klaso kaj, en Barato, kasto. Nun ili pensis ankaŭ pri lingvaj nejustecoj. Espereble, kiam tiuj ĉi studentoj mem ekinstruos en lernejoj, aŭ verkos studprogramojn, ili estos pli sentemaj kaj inkluzivemaj pri la kultura, aparte la lingva, diverseco de la lernontaro. Tiel, la fokuso estas ne la lingvo Esperanto mem, sed la vaste dividitaj valoroj de la Esperantujo – ekzemple tiuj kiuj troviĝas en la Praga Manifesto.

Mi aldonu, ke kursofine, restas sufiĉe pozitiva impresio pri Esperanto, kaj preskaŭ ĉiuj el ili kapablas krei, “Saluton!” kaj “Ĝis revido!” Konklude do, Esperanto ja estas valora pensilo pri la kultura diverseco. Esperanto-movadoj povas kunlabori kun jam ekzistantaj instancoj turismaj por reklami pri la landa bunteco. Sed nia forto ankaŭ estas, ke pere de nia komunikilo Esperanto, ni interŝanĝas spertojn pri niaj ordinaraj, ĉiutagaj vivoj. Ni kultivu tiujn lokajn aspektojn diversmaniere ĉe nia individua kaj kluba niveloj.

Enlande gravas ja la instruado de Esperanto. Sed gravas ankaŭ la disvastigo de la valoroj de la Esperantujo – komunika justeco, lingva inkluzivemo, kaj respekto kaj festado de lingva diverseco. Ju pli ofte ni montras tiujn valorojn des pli forta estus nia argumento por Esperanto. En mondo plene de kialoj por pesimismo, Esperanto estu inter nia rimedaro por optimismo.

[Oni povas senpage elŝuti la plenan julian numeron de la bulteno *Esperanto en Azio kaj Oceanio* de http://14.63.213.244:8004/index.php?mid=bulteno&document_srl=989246.]

(d-ro A. Giridhar RAO: rao.giridhar@apu.edu.in)

22. Internacia Pedagogia Revuo 2019/4

La numero de *INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO* IPR 2019/4 estos la centa, kiun la redaktoro Jozefo NEMETH preparis. Pro tio tiu numero estos iom speciala. IPR estas la organo de la instruista ligo ILEI. Ĝi entenas gravajn informojn kaj lertigajn artikolojn, same raportojn pri sukcesaj metodoj kaj aranĝoj. La tria numero de IPR raportos ĉefe pri la Kongreso de ILEI en Serbio. La lasta numero de 2019 ankaŭ raportos pri la historio de la Ligo, ĉar ĝi ankoraŭ apartenas al ties jubilea jaro.

23. Language Problems and Language Planning (LPLP) 43/2 (2019)

Speciala Numero: 40 Years of Bill 101 in Québec, red. François Vaillancourt

Enhavo:

Artikoloj

François Vaillancourt. Assessing Bill 101 after 40 years: An introduction

Charles Castonguay. Quebec's new language dynamic: French fading fast

Michel Paillé. Succès et faiblesses de l'intégration des immigrants par la scolarisation obligatoire en français au Québec

Marc Termote. L'utilisation du français dans la sphère publique: travail, commerce et affichage

Gilles Grenier. Quebec's language policy and economic globalization

Richard Y. Bourhis. Evaluating the impact of Bill 101 on the English-speaking communities of Quebec

Recenzoj

Leigh Oakes k Yael Peled. *Normative Language Policy: Ethics, Politics, Principles*. Reviewed by Tomasz Soroka

Rachelle Vessey. *Language and Canadian Media: Representations, Ideologies, Policies*. Reviewed by Saira Fitzgerald

24. JKI: Lingvo Komunikado Informado

Ilona Koutny raportas:

Mi informas pri la ekzisto de la lingvistika revuo JKI (*Lingvo. Komunikado. Informado*) de la Universitato Adam Mickiewicz (UAM, Poznano, Pollando) kiu regule (ekde 2010, kiam mi iĝis kunredaktoro) publikigas sciencajn artikolojn ankaŭ pri esperantologio kaj interlingvistiko; krome ĉiuj artikoloj havas esperantan resumon.

Ĝi aperas unufoje jare. La 10a volumo en 2015 estis plene dediĉita al esperantologio kaj interlingvistiko. Sume, dum 9 jaroj en 9 numeroj aperis 760 paĝoj rilataj el esperantologio. Ĝi alireblas en la retejo de la revuo (<http://jki.amu.edu.pl>).

Artikoloj en la angla, pola, germana, franca kaj esperanto estas bonvenaj; post recenzado ili povas aperi.

25. Universitataj Esperanto-kluboj: TEJO serĉas informojn

La junulara Esperanto organizo TEJO ellaboris formularon por universitatklubaj aktivuloj. Per tiu formularo, la nova komisiono de TEJO pri universitatoj celas kolekti informojn pri homoj kiuj volas krei aŭ kreskigi Esperanto-klubon en sia universitato. Laŭ la komisiono: "Ni povis observi ke en kelkaj universitatoj, ĉar homoj estas nature scivolemaj pri esperanto, kiam reklamoj estas bone faritaj, kluboj povas tre rapide kreski. Ni do volas kolekti la sciojn de tiuj kiuj havis bonajn atingojn kaj transdoni ilin al la aliaj por varbi kiel eble plej efike. Ni jam havas ideojn kaj planojn pri reklamkampanjoj en universitatoj. Ni ankaŭ ŝatus krei reton inter universitatoj. Ni kreos publikan dokumenton kun viaj

respondoj. Se vi volas ke iu respondo (ekz. via retadreso) ne aperu publike, bonvolu aldoni "NP" (Ne Publikigu) post ĝi. Tiukaze nur la komisionoj legos ĝin."

<https://framaforms.org/formularo-por-universitatklubaj-aktivuloj-1565269524>

26. Falsaj novaĵoj

Skribas Rakoen Maertens:

La #Universitato de Kembriĝo lanĉis novan sciancan esploron pri falsaj novaĵoj; unike, #Esperanto estas uzata kiel ĉefa esploringvo por faciligi kulturan komparon. Helpu prui ke E-o utilas en la scienca mondo. Partoprenu, disvastigu; 15-minuta ludtasko.

27. Esperanto en Ŝanhaja Universitato

La 9an de septembro, komenciĝis nova kurso de Esperanto en Ŝanhaja Universitato de Internaciaj Studoj. La kurson gvidas sinjoro Zhou Tianhao, prezidanto de la Ŝanhaja Esperanto-Asocio, kiu uzas lernomaterialon redaktitan de li mem. La kurso okazas vespere de ĉiu lundo, kaj ĉifoje havas 25 studentojn.

28. Nacia legado en Esperanto en Krakovo, Pollando

Raportas Maria Majerczak:

La Nacia Legado en Esperanto en Krakovo estis, oni povas diri, tre sukcesa, ne nur pro la bona publika legado de 19 personoj, sed ankaŭ por novaj agadoj kaj kunlaboro de la loka aŭ regiona intelekta, artista, eldonista kaj lerneja medioj, kiuj estis reprezentataj en la aranĝo. Okazis postaranĝaj konkretaj kaj fruktodonaj interparoloj kaj poste, vespera renkontiĝo en kafejo. Ekestis novaj kunlaborkontaktoj. Do krom la ĉiujaraj aranĝoj kaj agadoj de la E-medio de la Jagelona Universitato, okazantaj grandparte en la nemovada tereno, nun junaj aŭ novaj esperantistoj aliĝos al pluraj aldonaj valoraj projektoj. Ni mencias ĉi tie nur du el ili:

- La delegacio de la Zamenhof-lernejo en Zagórnik gajnis kunlaborantojn por la preparata internacia E-feriado por diverslandaj esperantistoj. Tiu aranĝo estos ligita kun partopreno, la 3-an de junio 2020, en la solenaĵo okaze de la 30-jariĝo de la Zamenhof-patroneco de la lernejo.
- Startis eldonado de E-libroj en Krakovo, en la eldonejo INSURREART de Barbara Jeziorek, juna esperantistino. Ĝuste pro la Nacia Legado estis eldonita, kiel la unua libro en Esperanto, "La saĥemo" ("Sachem") de Henryk Sienkiewicz (trad. Maria Majerczak), kaj jam estas eldonitaj du libroj (<https://insurreart.com>).

La legadon partoprenis ankaŭ esperantistoj el aliaj landoj. La publika aranĝo estis organizita de la Scienca Esperanto-Rondo de la Jagelona Universitato kaj okazigita en la Vojevodio Publika Biblioteko en Krakovo, kunlabore kun tiu biblioteko.

29. Novaĵoj el la Universitato de Masaĉuseco

Antaŭ pluraj jaroj la Universitato de Masaĉuseco, Amherst, Usono, ricevis donace grandan kolekton de libroj kaj periodaĵoj en Esperanto de la en 2017 forpasinta aktiva esperantisto Allan Boschen. Estis decidite sisteme kolekti materialon en Esperanto kiu fariĝu kolekto por studado de sociaj movadoj en Usono kaj Kanado. Depost tiam, alvenis al la Biblioteko Du Bois en tiu universitato plia materialo el la paperoj de konata pioniro de Esperanto Mark Starr kaj granda parto de la arkivoj de la usona landa Esperanto-asocio – plus kelkaj pliaj donacoj. Esperantic Studies Foundation subvenciis ordigon de la materialo kaj mem kontribuis librojn. La Kolekto Boschen estas konsultebla ĉe: <http://scua.library.umass.edu/ead/murb028>. Interesatoj pri studado de la materialo kontaktu ESF. ESF kunlaboras ankaŭ kun la Universitato Princeton, kiu same celas krei fortan kolekton pri planlingvoj kaj ricevis subvenciojn kaj kelkcent librojn de ESF.

30. Amerika Konsilio pri Fremdlingva Instruado (ACTFL)

La jarkongreso de ACTFL okazos de vendredo, 20 novembro, ĝis dimanĉo, 22 novembro (kun antaŭkongresaj atelieroj la 19-an de novembro) en **Kongresejo Henry B. Gonzalez, San Antonio, TX**. La kongreso de ACTFL prezentas pli ol 800 edukajn sesiojn kiuj kovras vastan gamon de la prilingva profesio. Temas pri nacia aranĝo kiu kunigas pli ol 7.000 kongresanoj el ĉiuj lingvoj, niveloj kaj formoj ene de la profesio.

La celo de la jarkongreso de ACTFL estas prezenti inkluzivan evoluosperton por lingvoedukistoj de ĉiuj lingvoj kaj niveloj. Aparte trafaj proponoj pritraktas la bezonojn de hodiaŭaj lernantoj kaj edukistoj kun fokuso je novigaj programoj, aperantaj tendencoj kaj explore bazitaj praktikoj. Legu la instrukciojn zorge antaŭ ol rete prezenti vian proponon.

Ni instigas ĉiujn lingvoedukistojn prezenti proponon por nia konsidero. La limdato por proponoj estas **Vendredo, 10 januaro, 2020**, je 23:59 laŭ Orienta Horzono. <https://www.actfl.org/actfl2020/>

31. Simpozio pri Planlingvoj kaj Lingvoplanado

Kvindeko da fakuloj el dek landoj kunvenis en Vieno la 24-an kaj 25-an de oktobro 2019 por festi la 90-an jubileon de la Esperanto-Muzeo en simpozio organizita de la muzea teamo kaj ties gvidanto Bernhard Tuidler. En ok sesioj interenacie konataj universitatanoj kaj fakuloj prezentis siajn studojn kaj eldonaĵojn, kiuj ankaŭ respegulis la gamon kaj diversecon de la kolekto de la muzeo. Temoj variis ekde ŝanĝo kaj diverseco en lingvomuzeoj, planlingvoj kaj lingvoplanado ĝenerale, ĝis la historio kaj aktuala de Esperanto.

La simpozia lingvo estis la angla – kio ebligis la partoprenon de pluraj fakuloj neesperantistaj. Ili prezentis jenajn referaĵojn:

Ottar Grepstad, Director (1999–2018), Norwegian Centre for Language and Literature, Ørsta; founder of the International Network of Language Museums (2016). *Language Museums of the World: Change, Diversity and Opportunities* [*Lingvaj muzeoj de la mondo: Ŝanĝiĝo, diverseco, eblecoj*]

Bernhard Tuidler, Team Leader, Department of Planned Languages and Esperanto Museum, Austrian National Library. *The Esperanto Museum and the Department of Planned Languages of the Austrian National Library* [*La Esperanto-Muzeo kaj la P[lanlingva Fako de la Aŭstra Nacia Biblioteko*]

Sabine Fiedler, Associate Professor, Department of British Studies, University of Leipzig; president, Society for Interlinguistics (Gesellschaft für Interlinguistik e.V.). *Planned Languages – Conlangs* [*Planlingvoj – Kon-lingvoj*]

Anna-Maria Meyer, Postdoctoral Researcher in Slavic Linguistics, Department of Slavic Studies, University of Cologne (Germany). *Slavic Planned Languages* [*Slavaj planlingvoj*]

Tomasz Kamusella, Reader in Modern History, University of St Andrews, Scotland. *Creating Languages in Central Europe in the 19th and 20th Century* [*Kreado de lingvoj en meza Eŭropo en la 19-a kaj 20-a jarcentoj*]

Klaus Schubert, Professor of Applied Linguistics/International Specialized Communication, University of Hildesheim. *Designed Languages for Communicative Needs within and between Language Communities* [*Fasonitaj lingvoj por komunikaj bezonoj en kaj inter lingvokomunumoj*]

Michael Gordin, Rosengarten Professor of Modern and Contemporary History, and Director of the Society of Fellows in the Liberal Arts, Princeton University. *Max Talmey and Gloro* [*Max Talmey kaj la lingvo Gloro*]

Vesna Lušicky, Senior Lecturer, Centre for Translation Studies, University of Vienna. *Eugen Wüster and his “Key to International Terminology”* [*Eugen Wüster kaj lia “Ŝlosilo al Internacia Terminologio”*]

Denis Eckert, Research Director, Géocités (CNRS, Paris) and Centre Marc Bloch (Humboldt University, Berlin). *Dr. Esperanto’s “International Language”: the Fifteen Languages of a Universalist Manifesto (1887–1890)* [*La “Lingvo Internacia” de Doktoro Esperanto: La dek kvin lingvoj de Universalisma Manifesto (1887-1890)*]

Roberto Garvía, Professor of Sociology, Department of Social Sciences, Carlos III University of Madrid. *Esperanto and its Rivals. Esperanto – Volapük – Ido*

Javier Alcalde, Associate Professor of Political Science and International Relations, Open University of Catalonia (UOC) and Autonomous University of Barcelona (UAB). *Esperanto among the Pacifists before and during World War I* [*Esperanto inter pacifistoj antaŭ kaj dum la Unua Mondmilito*]

Humphrey Tonkin, President Emeritus and University Professor of Humanities Emeritus, University of Hartford, USA. *Gyula Baghy, Kálmán Kalocsay and Tivadar Soros: Literatura Mondo and the Making of Esperanto Literature* [*Gyula Baghy, Kálmán Kalocsay kaj Tivadar Soros: Literatura Mondo kaj la kreado de Esperanto-literaturo*]

Zorana Sokolovska, Postdoctoral Researcher in Sociolinguistics, Institute of Multilingualism, University of Fribourg, Switzerland. *Esperanto Discourse in Switzerland in the Beginning of the 20th Century* [Esperanto-diskurso en Svislando komence de la dudeka jarcento]

Pascal Dubourg Glatigny, CNRS Research Director, Centre Alexandre-Koyré, École des hautes études en sciences sociales (Paris). *Esperanto and World War II* [Esperanto kaj la Dua Mondmilito]

Federico Gobbo, Professor of Interlinguistics and Esperanto, University of Amsterdam. *Hollywood Languages: The Challenge of Interlinguistics in the New Millennium* [Holivudaj lingvoj: La defio de interlingvistiko en la nova jarmilo]

Seán Ó Riain, Deputy Head of Mission, Embassy of Ireland to Austria, Deputy Permanent Representative at the Mission of Ireland to the International Organisations (Vienna) and President of the EEU/European Esperanto Union. *Esperanto and the European Union* [Esperanto kaj Eŭropa Unio].

Resumoj de la referaĵoj troviĝas ĉe

https://www.onb.ac.at/fileadmin/user_upload/PDF_Download/ESP_abstracts.pdf

32. Universala Kongreso de Esperanto, aŭgusto 2020

La 105-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Montrealo de 1 ĝis 8 aŭgusto, 2020, sub la temo “UN 75-jaraĝa: dialogo kaj interkompreniĝo en ŝanĝiĝanta mondo.” Ĝi celas emfazi la kontribuon de Unuiĝintaj Nacioj al paco kaj kompreniĝo de post sia fondiĝo, La ĉiujara Esperantologia Konferenco okazos en la kadro de la Kongreso, kaj Nitobe-simpozio, organizita de ESF, kunvenos tuj post la kongreso.

UEA invitas prelegi en la 73-a IKU-sesio en Montrealo. Kadre de la 105-a UK en Montrealo okazos la 73-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato. UEA invitas profesorojn, docentojn kaj personojn kun similaj kvalifikoj sendi proponojn pri prelegoj al la sekretario de IKU (amri@huji.ac.il). La proponoj alvenu plej laste la **15-an de Januaro 2020**. Lige kun la IKU okazos studsesio de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS). Kandidatoj por IKU-prelego povas samtempe proponi AIS-kurson, kiu konsistas el unu prelego kadre de la IKU kaj el du kromaj prelegoj. Tiukaze bonvolu indiki, ĉu la IKU-propono estu konsiderata ankaŭ kiel AIS-kurso.

33. Postskriboj

La Komisiono de ILEI pri Universitata Agado kreskis al 11 membroj kaj subgrupo de ĝi agadas regule, kunvenas skajpe kaj informas vastskale. Gratulojn!

Por sampli ekzemplojn de maŝine generita Esperanto, turnu vin al: <https://martinrue.com/how-does-esperanto-sound/>

Eldonas Ipl: Esperantic Studies Foundation (ESF) kaj Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio (UEA), Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. www.esperantic.org. ISSN 1385-2191. Ĉi tiun numeron redaktis: Humphrey Tonkin kun helpo de Angela Tellier kaj Yevgeniya (Ĵenja) Amis. Redakcio (kontribuoj, ricevado de la bulteno, k.s.): ipi@esperantic.org. Kunlaborantoj el ĉiuj mondaj regionoj estas bonvenaj. <https://twitter.com/esperanticsf>, <https://www.facebook.com/esperantic/>
